LA VERDA LUPEO



INFORMILO de ELF/AREK

Decembro 2022 ***54-a jaro*** ***N-ro 191***

Esperanto-Ligo Filatelista /Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Redakcia skipo: Bert BOON - Merelhof 8 - BE-3300 Tienen
Elda DOERFLER - Via del Ghirlandaio 18/1 - IT-34138 Trieste
James REZENDE PITON - Rua Aristides Perini 48 - BR-13141-025 Paulínia-SP



KARAJ GELIGANOJ!

Bonan Novan Jaron! Ja, tiu ĉi mia enkonduko ŝajnas mokŝerco, sed tio tute ne estas mia intenco. Foje agado estas malhelpata de diversaj kontraŭaĵoj kaj problemoj, interalie teknikaj, kio ĉi-okaze malfruigis la akuratecon de aperigo de via LVL. Mi pardonpetas pro ĉio ĉi! Tamen, same, bonvolu akcepti miajn plej sincerajn dezirojn de serena, feliĉa kaj bonsukcesa daŭrigo de ĉi 2023-a jaro.

La aŭgusta LVL, de vi ricevinta, ŝajnis al mi tikle interesa, precipe pro tiu hazarda malkovro de la kroata pm-o (2015) eldonita por memori la Tagon de Sankta Valenteno, kio min instigis aranĝi konkurson. Certe vi atendas sciigojn pri ties rezultoj, sed mi decidis prokrasti ĝin ĝis la venonta aprila LVL. Kial? Unue ne kontentigas min la nombro de konkurintoj, due ĉar aperis kelkaj neesperantistaj junuloj, kiuj petis permeson partopreni en ĝi. Do, kial refuzi tiujn neatenditajn konkursontojn? Tial, la ĝustajn respondojn aperos nur en la aprila revuo. Do profitu de tio ĉi por kunludi - atendas vin interesaj premioj!

Antaŭ pli ol ĉ. du monatoj mi ricevis de s-ino Loes Demmendaal pakaĵon pli ol 4-kilograman, enhavantan centojn da esperantaĵoj (glumarkoj, poŝtmarkoj, stampoj, ktp). S-ino Demmendaal, esperantisto, ekonomikisto, komitatano C dum pluraj mandatoj, estrarano respondeca pri administrado kaj financo (2007-2013), de 2010 komitatano de UEA por Esperanto Nederland, heredis de sia patro tutan kolekton da esperantaĵoj, enmetitaj en 25 albumoj, kiujn ŝi donacis (pravege!!!) al la E-Muzeo de Vieno. Tamen al ŝi restis pluraj duoblaĵoj, kiujn ŝi malemis forĵeti, tial ŝi min kontaktis, demandante, ĉu Elf-Arek akceptus donace tiun materialon. Imagu, ŝi eĉ ne petis repagon de la sendokostoj! Kompreneble ĝoje mi jesis al tiu ŝia bonvolema propono kaj jen nun la duoblaĵoj kuŝas ĉe mi. Ŝi eĉ di-

ENHAVO

Elda DOERFLER - V*ortoj de via prezidanto*	2
El la LEGANTARO - *En Poŝtokesto*	4
James REZENDE PITON - *Esperanto tra cenzuro (4a parto)*	5
Albert BOON - *Unuataga Memoraĵo 39-a UK en Harlemo*	10
Elda DOERFLER - *Abunda rikolto*	11
James REZENDE PITON - *La Poŝta cenzuro, unuapersone*	18
Elda DOERFLER - *Subskribo de Frans Schoofs*	22

Artikol-fontoj: Vikipedio; Vikiflandrio; Esperanto Muzeo Vieno; Bitarkivoj. **Esploritaj ĵurnaloj**: Belga Esperantisto 1910 kaj 1934; Britisch Esperantist 1913; Esperanto 1922; Germana Esperantisto 1928; Aŭstria Esperantisto 1934; Esperanto Triumfonta 1929 k.a.

vidis la diversajn aĵojn, laŭ la speco (sta, glm, pm…) kaj laŭlande, por plifaciligi la laboron de ties katalogado. Nuna mia devo estas skani la unu-



opajn erojn por ilia aperigado en la ttt-ejo de Elf-Arek, tiel ke la liganoj povos elekti, kion ili ŝatus ricevi donace: nura rekompenco estos bonvola kontribuo al la elsendokostoj. Por kiuj ne estas rete ligitaj, estos preparitaj koloraj kopioj, por ke ankaŭ ili ĝuu la ebl-on pliriĉigi propran kolekton. Pri la rezultoj de tiu ĉi iniciato, s-ino Demmendaal estos informita. Ŝi certe estos kontenta, ke ŝiaj donacoj ne kuŝos ie, neutiligataj, sed aliros la pasiajn kolektantojn. Rean dankon al Ŝi pro tiel bela kaj tre aprezata surprizo!

Jen nur iuj ekzempleroj eltiritaj el la ricevita materialo:










Sed tio ĉi ne estis la sola agrablaĵo lastatempe! Nova amiko mia, tre kompleze, plezurigis min kaj, sekve, ankaŭ vin, karaj Geliganoj, per neordinara ĝentilaĵo. Kiel skribite je paĝo 13-a, d-ro István Szabolcs, eminenta aktivulo sine de pro-esperanta aktivado en Eŭropa kampo, havigis al mi plurajn IPM-ojn, eldonitajn en la pasintjara decembro, okaze de la 120-jariĝo de Hungara E-Asocio. Laŭ lia deziro la senditaĵoj estos disdonitaj al la Liganoj: sekve oni ricevos ekzempleron ene de ĉi LVL. Tamen, ĉar la nombro de la ekzempleroj ne sufiĉos por ĉiuj, mi lotumos ilin kaj enmetos aliajn novajn IPM-ojn aŭ E-stampojn por kompensi la nericevon de tiuj hungaraj.

Kaj nun kelkaj koncizaj anoncoj:

★Bonvolu pagi la jaran kotizon 2023-an kaj eĉ tiun 2022-an, se hazarde vi ĝin forgesis. Se eventuale vi ne plu deziras esti membro de la Ligo kaj tute ne interesiĝas pri LVL, mi petas vin, tuj sciigi al mi, por ke Elf-Arek ne elspezu monon por preparado, multobligado, aĉeto de inko, papero kaj kovertoj, kaj fine por sendado, neutile.

★Por la ret-Liganoj: en marto okazos kunveno de Elf-Arek, dum kiu oni priparolos diversajn gravaĵojn. Ĝustatempe vi ricevos sciigon pri dato kaj horaro.

Vía Elda



En poŝtokesto

Ĉu nova rubriko? Jes, kial ne?!? Sed ĝi dependas de vi, karaj Gelegantoj, ĉar tiuokaze VI estos la protagonisto, la kritikisto ktp ktp.

Kiam ajn vi deziras, bonvolu sendi komenton, konsilon, helpopeton, membriĝ-peton... Skribu koncize kaj ĝentile kaj memoru, ke daŭre bonvenas artikoloj pri niaj ŝatataj temoj! Ek al skrib'!

Jen kion mi ricevis lastatempe de:

Albert Boon - Kara Elda, mi entuziasme bonvenigis la novan numeron de la informilo kaj ĉefe vian agrablan donacon, la valentenan poŝtmarkon. Scivolema kiel kutime, mi ankaŭ observis la reversan flankon kaj vidis, ke tie troviĝas ne nur spegulobilda teksto por blinduloj, tuŝebla averse (ĉu en kroata versio?) kaj krome du enigmaj truetoj, respektive supre maldekstre kaj flanke dekstre. Vi tute pravas alvoki la legantaron reagi iel post legado de (ĉiu) nova numero de LVL. Mi mem, kiel regula kunlaboranto, ne volas laŭdi, aŭ, pli korekte, nur volas laŭdi vin kaj James. Ke mi senĉese kaj ege entuziasme daŭrigas sendi kontribuaĵojn, pruvas, ke mi kontentegas pri nia revuo. Lasu min, kiel membro danki mian aŭtokratan prezidanton (mi preferas "prezidantinon" - mi ja estas feministo!) pro la neatendita donaco!



José Salguero - Mi kolektas pm-ojn kaj emas sendi ilin al esperantistoj. Mi havas milojn da duoblaĵoj. Se vi interesiĝas, bonvolu kontakti min per la retadreso saliko69@hotmail.com. Nur per Esperanto. En mia kolekto estas: Kelkaj Esperantaĵoj, ne multe: pm plus glm, sta, kovertoj k.a.; Poŝtkartoj pri E-Poŝt-kruciĝo; Ĉefa kolekto da birdo-pm-j (mi dezirus ricevi antaŭe bildoliston de mankoj); Kolekto da hispanaj pm-oj de 1960 ĝis 2020; Ĝenerala kolekto da tutmondaj pm-oj. Por pliaj detaloj, kontaktu min!

José Salguero - Rena 11 bajo derecha; ES-064000 Don Benito, Hispanio

Ann-Louise Åkerlund annlouiseakerlund@gmail.com **-** Mi iom sporade kolektas pm-ojn kaj nun posedas amason da duoblaĵoj, je kiuj mi ŝatus sendigi min. Ĉu eblus havi kontakton kun iu(j) kiu(j) interesiĝas pri svedaj poŝtmarkoj, ekzemple? Je dispono ankaŭ el aliaj landoj. Dankon!



Lastminute! Aperis ĉi-jare en Aŭstralio IPM, kun la sama bildo kiel en 2020, diferencas nur la nominala valoro, nome 0,65 anstataŭ la antaŭaj 1,10 aŭs. dolaroj. Se iu deziras ricevi ilin, bonvole kontaktu la jenan personon: drdada@gmail.com. La pm-o pageblas ankaŭ per PayPal.

Esperanto tra cenzuro

(la 4-a – kaj espereble lasta – parto)


James Rezende Piton

Fine de la Dua Mondmilito, kapitulacis en la unuaj tagoj de majo 1945 la germanaj armeoj en Italio, Danio, Nederlando, en la nordo de Germanio kaj en Aŭstrio. Post la milito, supozeble venus la fino de poŝta cenzuro (almenaŭ tiu leĝe starigita), ĝis la sekva milito, sed tio ne okazis en iuj landoj. Kaj niaj esperantistoj plu spertis ricevi leterojn en Esperanto, kiujn antaŭe legis cenzuristo.



Italio, la 21-an de aŭgusto 1945 Poŝtkarto en Esperanto sendita de Torino al Meksiko.

Stampo de la Militista Oficejo por Poŝta Cenzuro de Eksterlandaj Korespondaĵoj - TRAIRINTA en Ĝenovo.



Nederlando, la 9-an de julio 1945

Koverto adresita en Esperanto kaj sendita al Amsterdamo.

Referma paperstrio sub stampo de la nederlanda cenzur-servo.

La Aliancanoj - britoj, sovetoj, usonanoj kaj francoj - dividis Germanion en kvar administraj zonoj. La usona zono konsistis el Bavario, Hesse kaj parto de Baden-Württemberg. La britoj okupaciis la nordorientan parton.



Germanio (Usona zono), la 14an de marto 1947 - Letero en Esperanto, de Bad Tölz al Argentino, afrankita per 80 pfenigoj. La datstampo de la usona cenzurejo por civila poŝto montras, ke ĝi estis legita kaj liberigita la 17an de marto en Munkeno.





Germanio (Brita zono), la 30-an de septembro 1947 - Letero adresita al s-ro W. Simon en Esperanto kaj sendita de Hagen al Usono.


Stampo de la Brita Militista Cenzuro por civilaj korespondaĵoj, same kiel referma etikedo.

Dorsflanke la sama stampo, sed kun alia numero de cenzuristo.

En Aŭstrio la poŝta cenzuro plu funkciis eĉ dum 7 jaroj, ĝis 1953! La samo, kio okazis en Germanio, okazis en Aŭstrio, laŭ la administra okupacio de Aliancanoj. La centron de ĉefurbo, Zono 1, kunadministris kvarlanda grupo da militistoj. Tiun staton respegulis la tiamaj poŝtcenzuraj stampoj.



Aŭstrio, la 8-an de marto 1948 - Poŝtkarto tajpita en Esperanto kaj sendita de Vieno al Svedio. Stampo de aŭstria cenzura instanco por la centro de Vieno (Z. 1 = Zono 1) kaj alvenstampo de Filipstad (la 21-an de marto).



Francio, la 29-an de marto 1945 - Poŝtkarto skribita en Esperanto kaj sendita de Roubaix al Aŭstrio. Poŝta stampo de la cenzura instanco en la alveno al Soveta Zono de Aŭstrio (S.Z.).

Inter la landoj sub la influo de Sovet-Unio, Ĉeĥoslovakio ŝajne havis la plej longan cenzuron, postmilite, laŭ la nombro de korespondaĵoj, kiujn ni trovas.



Ĉeĥoslovakio - Poŝtkarto tajpita en Esperanto kaj sendita en la 31-a de decembro 1949 de Holicev Čechách al Germanio (Brita Zono).

Ruĝa stampo de cenzurejo en la ĉeĥa urbo Pardubice.

Laŭleĝa kontrolado de leteroj plu okazis kaj ni konas ekzemplojn en la militistaj korespondaĵoj de israelaj soldatoj en la 1960-aj kaj 1970-aj jaroj.

Preskaŭ 40 jarojn post la milito, la sociaj agitiĝoj en Pollando komence de la 1980-aj kulminis kun la starigo de "Militstato" fare de la registaro de generalo Jaruzelski, en la 13-a de decembro 1981. Tio estis lia provo bremsi la agadon de la sindikata organizaĵo "Solidarność" (Solidareco). Oni konstatis, ke la korespondaĵoj internaj kaj kun la eksterlando estis konservitaj en la unua duono de decembro 1981, atende de la dekreto. Tra la dua duono de tiu monato, dum la preskribitaj cenzuraj rimedoj estis organizataj, la korespondaĵoj ekfluis kaj ricevis la stampon "Necenzurita". Tio rolis kvazaŭ averto: ni ne cenzuras… ankoraŭ. La cenzuro de ĉiaj komunikiloj validis de la 1-a de januaro ĝis la 31-a de decembro 1982. La dekreto estis nuligita en junio 1983.



Pollando, la 7an de januaro 1982 - Letero adresita en Esperanto kaj sendita de Bielsko-Biała, unu el la 46 provincaj ĉefurboj kun cenzur-centro dum la unuaj semajnoj de la Militleĝo. Pollingva stampo* Ocenzurowano *(cenzurita) kaj du truoj de agrafo, kiu refermis la leteron, fare de cenzuristo.

Ĉu funkcias poŝta cenzuro ekzemple en nuntempa milito, en Ukrainio? Imageble ne. La tekniko por sekura transdono de mesaĝoj jam delonge ekzistas kaj oni ne plu kalkulas je tradiciaj poŝtaj servoj por tio. Retmesaĝoj, poŝtelefonaj mesaĝoj kaj retaj kanaloj kun sekureco (kriptografia) inter la partoprenantoj faras tion, tre malmultekoste kaj libere alireble Ni tre malverŝajne spertos novajn okazojn de (laŭleĝe kaj publike deklarita) poŝta cenzuro.

Se vi, leganto, konas aliajn spertojn de E-korespondado sub laŭleĝa poŝta cenzuro, bonvolu informi nin, laŭeble kun fotoj. Dankon!

UNUATAGA MEMORAĴO DE LA 39A UEA-KONGRESO EN HARLEMO

Albert BOON



Plene ilustrita la taga kartduono okaze de la 39a UEA-KONGRESO en la nederlanda urbo Harlemo.

Spuro de (dekstre vertikale) krajona linio supozigas, ke estis faritaj du samaspektaj partoj, poste distonditaj.

Maldekstre supre:

- surskriboj majusklaj: AANTEEKENEN (= REGISTRENDA)
  DRUKWERK (= PRESAĴO)
- Registra marko: R = registrita
  "HAARLEM 39 A Universala Kongreso de Esperanto"
  Hlm. = Haarlem
  7 = ?

Maldekstre sube: verda stampo kun silueto de la urba "Granda Preĝejo"

Dekstre supre: poŝtmarko de 20 centoj (100 centoj = 1 guldeno) kun busto maldekstren de la tiama reĝino Juliana

Dekstre meze: parte sur la poŝtmarko stampo kun ene kvinpetala stelo kun rabetoj kaj blazono de Harlemo



Surteksto: "HAARLEM 31.VII.1954./39A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO"

Dekstre sube: dua stampo kun la dato 31 VII 54 kaj ĉirkaŭskribo:

"AUTO-POSTKANTOOR" = "AŬTOMOBILA POŜTOFICEJO"

10 = ? tute sube: 3 = ?

Abunda rikolto

Elda Doerfler

2021 - Memoriga poŝtmarko „100 jaroj de EBLOGO“



La Esperanto-Blindulligo de Germanujo (EBLOGO) estis fondita en 1921 post la Praga Esperanto-Kongreso. En 2021 tiu asocio celebris sian 100-jariĝon. Tiam estis kreita speciala IPM-o valida por afrankado. La kostoj por ilin presi klare superas la afrankvaloron de 0,80 €. Tial folieto da 10 pm-oj kostas 15 € plus kromajn 5 por sendo.

La memorpoŝtmarko enhavas 2 germanlingvajn tekstoblokojn kaj plurajn simbolojn. En la supra duono staras la teksto **Internacia Planlingvo** en nigraj grasliteroj, meze sub tio la vorto **Esperanto** en verda grasa skribo. La subaj tri linioj el nigraj literoj tekstas: *100 jaroj de Esperanto-Blindulligo en Germanio •1921-2021*



Ambaŭflanke de tiu tekstobloko troviĝas stiligita okulo formita laŭ la blindeca simbolo de la Monda Blindula Unio. Tra la tekstoj, surfone, videblas granda, palverda Esperantostelo.



Vi povas mendi la memorigan poŝtmarkon „100 jaroj de EBLOGO“ ĉe EBLOGO@Esperanto.de (link sends e-mail)


2022 - UK en Montrealo




Riĉa estis la produktado de esperantaĵoj okaze de la 107-a UK. Maldekstre la jam bone konata glumarko, simbolo de la kongreso.

Ekzistas ankaŭ pli granddimensia, je 95-milimetra diametro.





Krome estis eldonitaj du diversaj poŝtmarkoj, kiuj elĉerpiĝis preskaŭ tuj, tiom ke ili ne plu aĉeteblas. Nu, almenaŭ la bildoj koneblas.



Bedaŭrinde malmultaj informoj atingis min, tial oni devas kontentiĝi pri bildoj, kiuj verdire ne estas tro netaj.

Je la maldekstra flanko de la memorfolieto Zamenhofa estas aldonaĵo kun 5x5 memgluaj poŝtmarkoj.

Sur la folieto, en la malsupra parto, estas skribitaj la jenaj klarigoj:

D-ro Ludwig Lejzer Zamenhof
(1859 -1917)
Pola okulisto kaj kreinto de la internacia helplingvo Esperanto. Li vizitis Kanadon en 1910.

Ĉi pm-o estis eldonita de Andy Blair, el Halifakso, tre aktiva kanadana esperantisto, kies vervaj ideoj estas diskonigindaj, precipe inter ni Esperantaĵ-kolektantoj.

Mi konsilas vin, legi lian artikolon *De butiko al bazaro*, aperintan en *La Merkato*, organo de IKEF.

Al vi la ligilo: *http://esperanto-indre.com/IMG/pdf/la_merkato_101a.pdf*

2022 - Hungaria E-Asocio 120-jara

En Hungario, kiel sciate, Esperanto estis menciita jam en la jaro 1897. Sekvajare aperis la unua lernolibro verkita por hungaroj fare de Ábel Barabás. La fondiĝo de la asocio okazis komence de marto 1902. En Budapeŝto la unua Esperanto-gramatiko estis publikigita aprile 1903.

En 1932 fondiĝis Societo de Hungaraj Esperanto-Pedagogoj. Inter 1964 kaj 1969 okazis somere Internaciaj Seminarioj de E-Pedagogoj en la urbo Szeged, dum 10 tagoj. En 1966 komenciĝis la E-instruado en la budapeŝta universitato ELTE por havigi al la studintoj diplomon pri mezlerneja instruado.



IPM el 2009

En 1922 (antaŭ 100 jaroj!) pluraj eminentuloj fondis la faman beletran revuon *Literatura Mondo*, kiu iĝis la plej konata literatura kaj arta organo de la esperanta kulturo, kerno de la t.n. *Budapeŝta Skolo*, kies spirita gvidanto estis unu el la fondintoj, Kolomano Kalocsay. Dum la jaroj aperis multaj libroj: originalaj kaj tradukitaj literaturaĵoj kun la kontribuo de pluraj talentaj verkistoj kaj



IPM el 2008

tradukistoj, krom la du granduloj - Kalocsay kaj Baghy. En 1983 oni eldonis la kolektaĵon *Hungara Antologio*, el kies partoj du jarojn poste aperis la unua esperantlingva sondisko *Bukedo* el la hungara poezio. Esperantaj radio-elsendoj komenciĝis en 1939, kiuj kun kelkaj jarinterrompoj daŭris ĝis 1989. En 1982 la fama *Kolektaĵo Fajszi* iĝis ŝtate aŭspiciata: nuntempe ĝi troveblas en la Landa Fremdlingva Biblioteko, en Budapeŝto. La (tiama) Hungara Esperanto-Asocio estis la unua inter la enlandaj organizaĵoj, kiu ricevis la ordenon *Paco kaj Amikeco*, en 1987, pro agado pri internacia paca kunlaboro. Budapeŝto trifoje gastigis UK-ojn: 1929, 1966, 1983.









La gvidantoj kaj la anoj de la landa asocio ĉiam aktive kaj entuziasme partoprenis en la organizado de tiuj gravegaj eventoj, samkiel en aliaj por-esperantaj okazaĵoj. Tian sintenon ni devas havi nun kaj en la estonto, tio estas nia celo. Okaze de la 120-a datreveno, la estraro de HEA aperigis festenan poŝtmarkon kun la hungarlingva teksto „120 éves a MESZ" (HEA estas 120 jara).

Budapeŝto, la 1-an de aprilo 2022

El raporto de Gyöngyi Mézes (Perla Mielo) en la nomo de la HEA-estraro

Pliaj detaloj ĉe https://esperantohea.hu

Pro ĉiuj ĉi kaj sekvaj informoj mi kore dankas al Amiko István Szabolcs, kiu tre malavare donacis al mi dekojn de tiuj pm-oj kaj tutsamideane gratulas, nome de la tuta ELF-AREK, la aktivan kaj plurfacetan agadon de la Hungara Esperantistaro.



Teknikaj sciigoj: La IPM surhavas la oficialan emblemon de HEA, kun indiko pri ĝia 120-jariĝo. 250 ekzempleroj estis eldonitaj tiuokaze, en du versioj. La emblemo estas verko de la vic-prezidanto János Nagy; redaktoro: István Péter, estro de la universitata fako.

La aŭtoro kaj dezajnisto de la pm-o estas János Nagy. Kunlaboris Zoltán Barta, sistemadministranto. Ĝia grando: 55 mm x 25 mm. Nominala valoro: po 145 HUF, por enlanda sendo (=belföld). Ĝi aĉeteblas ĉe HEA.



2022 - Itala Stampo

Okaze de la 89-a Itala kongreso de Esperanto (20-27 aŭgusto) la poŝtofic-istoj stampis elsendotajn korespondaĵojn dimanĉon la 21-an de aŭgusto. La ronda stampo montras la bildon de la impona Breŝa kastelo, fortikaĵo star-igita mezepoke. Ĉirkaŭe la jenaj skribaĵoj: 89° Congresso italiano di E-o / 89-a Itala kongreso de E-o; dato: 21.8.2022.

Bona iniciato, kompreneble, de la LKK! Nura bedaŭro estas, ke la stampo ne klare videblis sur la poŝtkartoj prikongresaj: la bildo estis fakte tute ne distingebla en siaj detaloj.

Tiuokaze aperis ankaŭ 5 diversaj pk-oj kun vidaĵoj de Breŝo.



2022 - Serba stampo





En Senta okazis la 32-a tradicia renkontiĝo *Verdaj Amikaj Tagoj*, kies ĉi-jara ĉeftemo estis la vivo kaj laboro de D-ro Burány Béla.

Li naskiĝis en Senta februare 1931 kaj, samurbe, mortis decembre 2008. Li estis Vojvodina kuracisto, epidemiologo, etnografo, sociologo kaj verkisto.

Ekde 1991 ĝis sia emeritiĝo en 1996, li gvidis la epidemiologian sekcion de Onkologia Instituto en Kamanca. Jam en la 1961-a jaro li ekkolektis hungarajn lirikajn popolkantojn kaj novelojn; dume li publikigis plurajn librojn pri medicino kaj hungariaj tradicioj.

La stampo akireblis ĉe la ĉefpoŝtoficejo la 16-an de decembro 2022. En ĝi meze, libro atestas pri lia verkemo, je ties ĉi maldekstro plumo en inkujo kaj dekstre la Hipokrata simbolo substrekanta lian sindediĉon al medicino.

Al Imre Belec, kies konstanta kunlaborado estas por ELF-AREK tre grava, mi ŝuldas la poŝtkarton kun stampo kaj la interesan raporton pri la vivo kaj verkoj de doktoro Burány. Koran dankon al serba amiko!





Trovitaj ie-tie!

Tutaĵo kun privata surpreso, *Krasnojarska Esperantista Klubo*, ricevita donace de rusa aŭkciisto.

Sube kaj en la sekva paĝo, aŭkcie aĉetitaj, tri polaj kovertoj kun bildoj de LLZ kaj tri diversaj IPM.

Nenio alia konata.









En Bjalistoko estis eldonita stampo memore de la 130-a jariĝo de Esperanto kaj de LLZ, kreinto de la internacia lingvo.

La tri IPM estis eldonitaj de Pola nacia poŝtoficejo A kaj validis por sendo enlanda ĝis 350g kaj ĝis la jena dato: 2018-07-02.



Bildo hazarde trovita!

En la flanka bildo, estas oficiala pm-o, kun nominala valoro de 10 kronoj, kiu estis emisiita en Ĉeĥio je la 5-a de novembro 2008.

La talono estis aldonita en februaro 2009.

Ne estas konata la eldonkvanto.

La pm-a kaj talona formatoj egalas al 27x33 mm.

En la bildo de la pm videblas *Neĝa sceno kun infanoj*, dum sur unu talono aperas la urba emblemo kaj sur alia la informo pri la 100-jariĝo de la E-klubo Prostějov en la ĉeĥa lingvo. En la poŝtmarka katalogo de Elf-Arek, aperas nur senkolora bildo de la du unuaj poŝtmarkoj ĉe la maldekstra angulo.

1936 - Portugalaj gm-oj



① ② ③ ④

Aĉetinte albumeton kun plurdeko da glumarkoj desegnitaj de la ĉeĥa gravuristo kaj esperantisto Josef Kocourek, mi malkovris en ĝi, tute ne atendite, ankaŭ du strietojn da glm-oj, ne de la sama desegnisto.

Unu estas verda kaj la dua ruĝa. Sur ĉiu strieto estas kvar diversaj glm-oj. Mezuro de unuopa glm: 2,8 x 3,8 mm; longo de la kvaropo: 11,8 mm
Presita sur ĉiu bildo estas la vorto *Nova Sento* kaj sur la unua, dua kaj kvara aperas ankaŭ la nomo *Esperanto*. En la 2-a legeblas malsupre: maldekstre *Portugalio* kaj dekstre la nomo de la grafikisto *A.(madeu) Monteiro*. Ĉe la 1-a, 3-a kaj 4-a aperas nur la inicialoj *A.M.*
Pri la bildoj, de maldekstre: firma mano tenas fiere martelon, super kiu videblas la stelo; laboristo, kun enmane martelego, inter du fumantaj kamenoj, kaj surfone vualita stelo; viro liberigas sin de mankatenoj kaj liberigas la mondon per *nova sento* kaj, laŭŝajne, rigardas al suno havanta encentre stelon; ĉe la kvara glm, estas stilizita mondo "TERRA": en ĝi domoj kun







Enlanda Movado

Lisbono. — *Esperantista Societo «Nova Sento».* — Nun funkcias du kursoj: elementa kaj praktika, ambaŭ gvidataj de k-do Amadeu Monteiro, kies malfermoj okazis la 1-an kaj 19-an de Junio. Ankaŭ sukcese daŭras kurso per korespondado. La propagandaj servoj de ĉi tiu Societo okazigis promenadon al Rocha de Carnaxide, dum kiu nia lingvo estis interkomprenigilo.

fumantaj kamenoj kaj supre, dekstre, la stelo.
Bedaŭrinde pri la aŭtoro malmultajn sciigojn mi trovis, nur ke li agadis en la E-Societo *Nova Sento*, en Lisbono, kiel Ĝenerala Sekretario, kaj ke li instruis nian lingvon. Estus bele, se iu el vi aldonus ion pri tiu ĉi esperantisto el la 1930-aj jaroj.



… Kaj por fini, interesa triopo el Gotenburgo, okaze de la Unua skandinava kongreso de Esperanto, 6-10 aŭgusto 1918. Mezuroj: po 35 x 40 mm.

LA POŜTA CENZURO, UNUAPERSONE

James Rezende Piton

Pensante pri poŝta cenzuro kaj cenzuristo, oni povas sin demandi: kiel tiu homo fine estis ŝarĝita de tia tasko? La aŭtobiografiaj notoj de germana verkistino rakontas pri la afero de iu, kiu estis kondukita al la rolo de poŝta cenzuristo dum la Dua Mondmilito.

Ni, filatelistoj, parolas pri "Cenzuro" kvazaŭ ĝi estus ento kun propra volo: "la Cenzuro ne toleris tion", "malfermita kaj inspektita de la Cenzuro" aŭ "la Cenzuro forigis parton de la korespondaĵo". Sed kiu estis "la Cenzuro"? Kompreneble la individuoj taskitaj kiel cenzuristoj sekvis instrukciojn, en la kontrolado de korespondaĵoj ĉu civilaj, ĉu militistaj, en loka aŭ fremda lingvo. Ili prilaboris milionojn da poŝtaj objektoj en ĉiu jaro de la militoj, sed ili estas plejparte anonimuloj.

LeMO-Lebendiges Museum Online (Vivanta Ret-Muzeo, https://www.dhm.de/lemo, iniciato de Fondaĵo de la Germana Historia Muzeo, de la Fondaĵo Historio-Domo de la Federacia Respubliko Germanio kaj la Germana Federacia Arĥivo) prezentas milojn da paĝoj kun tekstoj kaj bildoj, kiuj kovras la 19-an jarcenton ĝis nia tempo, kun la temo libereco kaj demokratio.



Josi von Koskull en 1975
(© *Deutsches Historisches Museum*)

En LeMO troviĝas raporto de germana verkistino **Josi (Josepha) von Koskull** (foto). Ŝi en 1898 naskiĝis en Latvio, en familio de aristokratoj, kiu originas en la 13-a jarcento. Ŝi ekde 1919 loĝis en Berlino kaj ĉiam laboris ĉu kiel ĵurnalisto, ĉu kiel bibliotekisto. Ŝi tradukis, el la rusa al la germana, verkojn de Puŝkin, Ĉeĥov kaj Leskov. Ŝi i.a. publikigis la librojn "La juna Puŝkin: biografio" (Steuben-Verlag, Berlino, 1948) kaj "Fe-rakontoj el la Balta Maro" (1960).

La 3-an de septembro 1939 Josi von Koskull ricevis la kunvokon sin prezenti en la sekva tago en la salono de la restoracio de la Bestoĝardeno de Berlino, loko por famaj eventoj kaj baloj, kun grandegaj ŝtuparoj kaj vastaj salonoj, kiujn ŝi konis pro sia ĵurnalisma agado (pri la fakoj kino kaj teatro) ĉe *Berliner Börsen-Courier*.

Ŝi tie renkontis grupojn da entuziasmuloj, kunvokitaj kiel ŝi. Iuj portis la uniformon de *Reichsluftschutzbund (RLB)*, la Ligo de Protektado kontraŭ



Poŝtkarto (uzita kiel Feldpost *en aprilo 1916) kun la Marmora Salono de la Berlina Bestoĝardeno*


(*Ed. Aktien-Vereins des Zoologisches*)

Aer-atakoj en la Regno, organizo de volontuloj por tujhelpo kaj preparado de domoj por rezisti al aliancanaj atakoj.

Kion ĉiuj kunvokitoj komune havis? Ili scipovis aliajn lingvojn. Ĉiuj havis siajn informojn kolektitaj kaj ili fariĝis rekrutoj sub la aŭtoritato de *Wehrmacht*, la germanaj Armitaj Fortoj, do sub milita leĝo.



Poŝtmarko de serio omaĝe al RLB



Maŝinstampo kun reklamo de RLB - "Aer-protektado estas nacia devo.

La rekrutoj dividiĝis laŭ grupoj kiel "Ĥemio", "Privata" ktp. Josi ligiĝis al la grupo "Komerco" pro sia iama sperto en bankaj laboroj. Nur poste ili komprenis, ke ili tie estas por cenzuristaj taskoj. Ĉiuj devis ĵuri maksimuman sekretecon por rajti reiri hejmen.

Josi estis tute malkontenta pri la neatendita komisio. Se ŝi devus agadi dum la milito, ŝi volonte rolus kiel flegistino de la Ruĝa Kruco. Ŝi eĉ bedaŭris sian lingvan talenton. Ŝi scipovis legi ok eŭropajn lingvojn krom la germanan kaj havis sperton en la tradukado por la gazetaro. Ŝia raporto registris, ke inter la lingvoj, kiujn ŝi lernis dum la milito, estas la ukraina kaj **Esperanto**.

“Poŝta Cenzuro” estis, en la imagpovo de la cenzuraj rekrutoj, spionado de intimaj leteroj, kiuj malfruiĝis por resti sub fremdaj okuloj. Josi, hazarde koincide, kelkajn semajnojn antaŭe legis libron, kiu i.a. aludis al la cenzurado de leteroj. Temis pri “La Aliaj Armiloj”, verko de J. C. Silber, kiu priskribis siajn spertojn dum la Unua Mondmilito. Per tiu libro ŝi eksciis pri la graveco de cenzuro dum milita stato, krom la eblecoj pri sabotado de tiu tasko. Silber laboris en grava departamento de la brita cenzuro, kie li spionis favore al Germanio.



Die anderen Waffen
(La Aliaj Armiloj),
de Joseph Crawford Silber,
kun la cenzuro kiel strategio.
Breslau, Korn Verlag, 1932.

Josi sciis, pro sia kontraŭfaŝisma kaj kontraŭmilitarisma karaktero, ke ŝi tute ne estos lojala kunlaboranto en la nazia maŝino. La 5-an de septembro startis la laboroj, sed malrapide ĉar malmultaj eroj estis liveritaj de *Deutsche Reichspost*, la germana poŝto, al la cenzuro. La instanco timis pri la malapero de registritaj leteroj, ĉar tio devigus la pagon de alta monkompenso al la sendinto.

Por ordinaraj korespondaĵoj, la kovertoj estis tonditaj en granda salono, fare de virinoj sen antaŭa sperto kaj el ĉiaj profesioj. Tiam la leteroj estis submetitaj al hemia testo, legitaj kaj denove fermitaj en la sama salono. La ĉefoj foje rekontrolis la faritan analizon kaj okazis malkaŝaj kaj malĝentilaj riproĉoj al la erarintoj, nejunaj sinjorinoj kaj sinjoroj.

La publiko de la bestoĝardeno ne komprenis, tiom da homoj libere enirantaj la salonojn, ne kiel vizitantoj. En Berlino cirkulis onidiro, ke tiuj en la salono estis nedanĝeraj pacientoj de la granda frenezulejo de Wittenau movitaj en la bestoĝardenon por lasi spacon en la frenezulejoj por danĝeraj maniuloj, kiuj fariĝis tiaj pro la teruraj spertoj en la fronto.

Josi rakontas, ke unu el la koleginoj en la cenzurfako III, "Komerco" (kiu baldaŭ kunigis 600 cenzuristojn) plendis, ke la komercaj mesaĝoj estis enuigaj kaj ke ŝi volis labori en la fako "Privataj leteroj". La estro de la fako, kiu laboris tre celkonscie, respondis al ŝi sed direktis sin al ĉiuj: "Gesinjoroj, sentu vin feliĉaj labori tie ĉi kaj ne pri privataj korespondaĵoj. Se vi trovos zorgigan frazon, vi devos decidi ĉu denunci aŭ ne la sendinton. Malĝojaj historioj la tutan tempon. Nur tute frivolaj kaj senanimaj homoj ne sentas sin tuŝataj de tiu homa mizereco". Josi poste laboris en tiu fako kaj konstatis, ke la estro pravis. Ne eblis, ne senti solidarecon. Sed ŝi rimarkis, ke la plej multaj kontrolistoj ja estis tiel nesentemaj kaj ne pensis pri la homoj malantaŭ la leteroj. Ili fiere liveris neregulajn mesaĝojn al la respondeca superrigardanto. La moralo estis en malrapida kaj konstanta malfortiĝo, atentigis ŝin.

Ŝi cetere aldonis, ke la oficejo de cenzuro (ABP) en Berlino multe kreskis. Sed amaso da kontrolistoj estis kontraktita kun lingva talento tre modesta kaj ĝenerala klereco eĉ pli malvasta. Venis iamaj dancistoj, eksaj cirkoartistoj, pentristoj, muzikistoj, servistinoj kaj eĉ bienuloj el Afriko (kun scipovo de la svahila aŭ nekutimaj afrikaj dialektoj).

La cenzurejo en Vieno (en la Regno estis krome cenzur-oficejoj en Königsberg, Frankfurto, Munkeno, Kolonjo, Hamburgo kaj Vieno, i.a.) estis ofte laŭdata pro la inteligenteco de la oficistoj. Oni uzis ilin kiel ekzemplojn en la trovado de spionoj kaj sekretaj mesaĝoj. Ili trovis kaŝitajn mesaĝojn en instrukcioj de brodaĵo, laŭ la kolor-kombino. Alia ekzemplo estis mesaĝo ĉifrita en muziknotoj, ĉar la melodio estis sensenca.

La oficejo funkciis kun du skipoj, inter la 8-a kaj la 14-a horo kaj inter la 14-a kaj la 20-a horo. Maksimume 6 horojn tage, ĉar oni laboris sub la lumo de ole-lampo, kio estis laciga por la okuloj. La organizo fariĝis pli rigida kaj malpermesis al la cenzuristinoj uzi ŝminkaĵojn, por montri militistan disciplinon. Ĉiuj oficistoj laboris sub minaco, ke, okaze de grava disciplina manko, ili estos senditaj al Dachau-koncentrejo, sed Josi apenaŭ vidis tion efektive okazi.

Ŝiaj memoroj pri tiu tempo finiĝas per la kristnaskaj festoj de Gestapo, kiuj estis devigaj, formalaj kaj nerifuzeblaj. Kun multaj artistoj inter la cenzuristoj, la programoj estis longaj. Jaron post jaro tiuj "festoj" fariĝis pli melankoliaj, de iamaj tagmanĝoj en restoracio de operejo al simpla kunveno kun kuko kaj malbona hordea kafo, kiun ili mem kunportis.

Danknoto: Menciindas, ke la uzo de la foto de Josi von Koskull kaj ŝiaj notoj en *La Verda Lupeo* estis afable permesita de *Deutsches Historisches Museum*, Berlino.

Subskribo de Frans Schoofs


Elda Doerfler

Kiom ni scias pri niaj multnombregaj antaŭuloj? Foje multon, foje nur maldetalajn sciigojn, foje eĉ nenion. Nunatempe, danke al amaso da enretigitaj ĵurnaloj, revuoj, libroj kaj biografioj, scivolema kaj esplorema esperantisto povas elŝuti vere vastan materialon, por konatiĝi kun pasintjaraj, eĉ pasintjarcentaj, homoj kiuj dediĉadis sian tutan vivon al la idealoj de Zamenhof kaj Esperanto, neniam enirinte la Panteonon de la eminentuloj. Ekzistis personoj kiuj faris el nia lingvo sian vivokialon, sen ajna pretendo, kun plena modesteco, kun silenta laboro, surmetante unu post la alia dekon, centon, milon da brikoj, por konstrui solidan bazon por la laborado kaj agado de la venontaj generacioj.

Tial, miaopinie, nia devo estas ankaŭ malaperigi la vualon de intenca aŭ foje malintenca forgesemo, kaj doni al ĉiu el ili la meritatan rekonon. Neniu el tiuj gajnos ion ajn el postmorta rekono, sed nia historio, la historio de nia Esperanto-movado, iĝos pli riĉa, se - ĉu loke, ĉu nacie, ĉu internacie - oni atribuos apartan omaĝon al tiuj, kies agado permesas al ĉiu el ni ĝuadi ĉiujn pozitivajn ecojn, spiritajn kaj materiajn, de la kreitaĵo Zamenhofa.



Jen foto de Frans Schoofs, kies agado grave kontribuis al disvastigado de Esperanto en lia naskiĝurbo Antverpeno, Belgio, jam junulaĝe, kaj sub ĝi lia subskribo.



Vere junaĝe li ekinteresiĝis pri Esperanto: tio okazis fine de la jaro 1906-a, danke al iu el liaj amikoj. Frans Schoofs, naskiĝinta maje 1888-a en Antverpeno kaj, samurbe, mortinta marte 1934-a, post grava kvartaga malsano, entuziasmiĝis pri la Lingvo, unue pro ĝiaj celoj homamaj kaj interfratigaj kaj due pro ĝiaj facileco, simpleco kaj logikeco. Per sia impeta kaj firma konvinko pri la valoroj de tiu ilo paciga li komencis tuj vastan propagandadon en siaj urbo kaj lando. Ĉi sian eklaboron li komunikis al tri el siaj amikoj, kiuj - siavice - proponis fondon de nova grupo, tiel ke, tujtuje, januare 1907 ekbrilis *La Verda Stelo*! De tiam lia fulmrapida agado seninterrompe daŭris ĝis la fino, bedaŭrinde tro frua, de lia vivo tera!

Estas nekredeble, kiom da taskoj li surprenis, kaj tiujn taskojn ĉiam, fidele kaj nelacigeble, plenumis ĝisfunde, honeste, serioze, brile kaj entuziasme, enkadre de la nacia kaj tutmonda movado.

Profesie, li estis sekretario de la Antverpena asocio de l' malkaraj loĝejoj, kie li deĵoris ĉiumatene, dum poste, de posttagmezo ĝis malfrua vespero, li sin dediĉis al sia amata Idealo.

Li verkis kaj ĉefe tradukis: RUĜKOVERTA BROŜURO, tradukita al Flandra lingvo: *Leerboekje van de Internationale hulptaal Esperanto*; LA MALNOVA FLANDRA PENTRISTA SKOLO; KION PATRINO POVAS SUFERI, de H. Conscience, el la flandra; GVIDLIBRETO DE ANTVERPENO; FUNDAMENTO DE ESPERANTO (*Fundament van Esperanto - eld. Flandra-holanda)* kaj aliaj.

Pri liaj funkcioj en Esperantujo:

Fondinto kaj prezidanto de la grupo *La Verda Stelo*, Antverpeno; fondinto de la revuo *Belga Esperantisto*, kaj post la milito, ĝia direktoro; kunfondinto kaj prezidanto de *Belga Esperanto-Instituto*; de post 1927 prezidanto de *Belga Ligo Esperantista*; honora membro de Antverpena Polica Grupo.

Li kunlaboris en la organizo de la Antverpenaj UK-oj - 1911 kaj 1928 - kaj estis teritoria UEA-delegito por Belgujo. Plie li aktivis kiel konstanta sekretario-kasisto de *Konstanta Reprezentantaro de la Naciaj Kongresoj*, kaj fine, per sia diplomatia kaj sincera klopodo, li sukcesis, kune kun Hugo Steiner, ebligi kaj realigi la repaciĝon (1933) de UEA kaj UFE (*Universala Federacio Esperantista*, nome federaciiĝo de landaj asocioj, sen individuaj membrecoj). Krom ĉio ĉi, li ĉiam estis je dispono por gvidi kursojn, prelegi ĉie ajn kaj preta servi dum naciaj, fakaj kaj internaciaj kongresoj.

Okaze de la 7-a UK Antverpena, *La Sepo por la Sepa*, kies Prezidanto de la Reklamada Sekcio li estis, iniciatis projekton pri starigado de Zamenhofa monumento, inaŭgurota dum la evento mem. Laŭ mia scio, bedaŭrinde tiu bela ideo ne realiĝis, sed tio rimarkigas, kiom plene kaj serioze engaĝita estis tiu LKK. Ĉi-sube, foto pri la eminente organizinta *Sepo*.



Starantaj, de maldekstre: Frans Schoofs, Willem Van dem Biest, Louis Ritschie, leŭtenanto Fr. Dupont; Sidantaj: Maria Elwoerhy-Posenaer, Amatus Van der Biest-Andelhof, Oscar Van Schoor.

Pleje min kortuŝis la artikoloj al li dediĉitaj okaze de lia abrupta forpaso, artikoloj kiujn mi invitas legi: tie oni parolas pri eminenta homo kaj esperantisto kiu glatigis nian paŝadon survoje al la glora celo. La ligilojn de la fontoj vi trovos je 2-a pĝ, sub la ENHAVO!

ELF-AREK

Esperanto-Ligo Filatelista
Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj


Prezidantino:
Elda Doerfler
Via Ghirlandaio 18/1 IT-34138 TRIESTE
testudo.ts@gmail.com

Jen mia bankokonto:
IBAN IT35 R076 0102 2000 0001 7452 996 – Banco Posta
BIC: BPPIITRRXXX Por: Elda Doerfler
UEA-konto: ELF/AREK - Kodo: elfx/r
Jarkotizo: € 17.00 - Membroj en socialismaj kaj ekssocialismaj landoj: € 15.00
Se vi ne havas aliron al nia konto ĉe UEA, bonvolu kontakti la prezidantinon.
Kunredaktantoj: James Rezende Piton - sudastelaro@gmail.com
Albert Boon, Esperanto-Numismatika Asocio bert.boon@skynet.be
Elf-Arek ttt-ejo: www.kolektado.esperanto.cc

★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★



Sepa Internacia Kongreso de Esperanto. Antverpeno, 20-27 aŭgusto 1911. 10. - Veturado al la Urbestrarejo (S-oj Grabowski Antoni, Giesswein Sándor, Mudie Harold Bolingbroke.)



Tuta serio da pk-oj kaj fotoj (ĉ. 30) estis presitaj okaze de tiu UK.

La 8an de januaro 1930, la subskribinto, F. Schoofs, sendis ĉi pk-on, al S-ro Arger el Parizo, dezirinta aĉeti la Belgan Antologion (2-voluman), eld. en 1928.